



Nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ



滿江紅

和鄭沫若

小窗寒球，

有墨千

蒼蠅碌碌。

啼之叫

幾日教

滿屋求

都成抽泣。

蟻蟻緣

檀冠法蘭

恨如子

枝或枝

淡何易正

西風蕭索

下苦七

飛鳴矯

多少事

從往

急天地

光陰過

二事

太久之事

朝至。海

翻江倒

雲水如

石炭溫

何毒海

要掃作

西塞人

金聖教

雨濛濛

九六三

二月

有春



# Prezidanto Maŭ

## Restas

### kun la Amaso

**P**EKINO, la ĉefurbo de nia granda patrio, estas la centro de la granda proleta kultura revolucio. En ĝi vidiĝas ĉie bolanta revolucia sceno kaj radias brila lumo de la penso de Maŭ Zedong.

Prezidanto Maŭ, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto, interligiĝas koro al koro kun la popolo.


Je la kvarono post la sepa, posttagmeze de la 10-a de aŭgusto, Prezidanto Maŭ venis al la amasa akceptejo en la sidejo de CK de la Ĉina Kompartio kaj intervidiĝis kun la revoluciaj amasoj de la ĉefurbo, alirintaj por gratuli la Decidon de la Centra Komitato de la Partio Koncerne al la Granda Proleta Kultura Revolucio.

En la pasia huraado de la amasoj, Prezidanto Maŭ kun intima rideto mansvingadis salute al la miloj kaj dekmiloj da laboristoj, kamparanoj, studentoj, revoluciaj oficistoj kaj loĝantoj de la ĉefurbo. Prezidanto Maŭ manpremis kun la antaŭenpuŝiĝantaj popolanoj kaj salutis ilin: **“Bonfarton, gekamaradoj! Bonfarton, gekamaradoj!”** Prezidanto Maŭ diris al ĉiuj: **“Vi devas zorgi pri ŝtataj aferoj kaj**

**konduki la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino!”**

Kiom da flamvarmaj koroj forte batadis, kiom da okulparoj treme brilis kun emociaj larmoj, kaj kiom da manoj kune etendiĝis al Prezidanto Maŭ! La granda gvidanto interligiĝas kun la popolo koro kun koro. Ĉiuj ĝojkriadis: **“Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu!! Vivu longe!!!”**

En la 18-a kaj la 31-a de aŭgusto kaj la 15-a de septembro, sur Tian-anmen-placo, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biao, kune kun la aliaj gvidantaj kamaradoj de la Centra Komitato, tri fojojn akceptis milionojn da ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la ĉefurbo kaj el diversaj lokoj de la tuta lando. La ĉiufoja akceptado ja forte ekscitis iliajn bolantajn batalvolojn por la revolucio. Sur Tian-anmen-placo, leviĝis la ruĝa suno el la oriento, centoj kaj miloj da ruĝaj flagoj flirtadis en vento. La ruĝaj gvardianoj kun ruĝaj brakrubandoj kaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj tenis ruĝkovrilajn libretojn de la *Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ* en siaj manoj kaj laŭte kantis *Navigadon en Maro Oni Dankas*



*Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ sur la pordego Tian-anmen*

*al la Direktisto* kaj aliajn revoluciajn kantojn por ricevi revuadon de la plej plej estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, kiun ili tagnokte sopiras vidi. La tuta placo fariĝis maro en ruĝo. La huraado de “Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu! Vivu longe!” tondradis ĝis la ĉielo, kaj la centmiloj da junaj, revoluciaj kaj ruĝaj koroj inklinas al la ruĝa suno.

Ĉiufoje, Prezidanto Maŭ vestis sin per verda armeana uniformo kaj, kun ruĝe radianta vizaĝo kaj spirito plena de vigleco, salutis per mansvingoj la ruĝajn gvardianojn kaj revoluciajn instruistojn kaj lernantojn.


Je la 15-a de septembro, en la mitingo, en kiu Prezidanto Maŭ akceptis milionon da revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj ruĝaj gvardianoj venintaj el aliaj lokoj al Pekino por fari revolucionan kontaktadon, kamarado Lin Biaŭ faris paroladon, en la nomo de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Li diris: “La fundamenta kontraŭdiro, kiu devos esti solvita de la granda proleta kultura revolucio, estas la kontraŭdiro inter la du klasoj, la proleta kaj la burĝa, kaj inter la du vojoj, la socialisma kaj la kapitalisma. La ĉefa celo de atako en la nuna movado estas tiuj potencotenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. Bombardi la komandejojn estas bombardi la plenmanon da potencotenantoj tiaj. Nia lando estas lando de la proleta diktaturo. La gvidanteco de nia lando estas en la manoj de la proletaro. Batalo kontraŭ kaj faligo de la plenmano da potencotenantoj, kiuj iras la kapitalisman vojon, ĝuste celas firmigon kaj fortigon de la proleta diktaturo de nia lando.”

Kamarado Ĝoŭ Enlaj diris al la mitingo, ke per unu mano oni devas teni la revolucion kaj per la alia la produktadon, por garantii la venkojn ambaŭ en la granda kultura revolucio kaj la produktado de industrio kaj agrikulturo!

Antaŭ Prezidanto Maŭ la ruĝaj gvardianoj ĵuris: Ni estas la revoluciaj daŭrigantoj kaj la filoj de la popolo. Ni decideme aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ, nin hardos kaj kreskos en ventegoj kaj ondegoj, sekvante por ĉiam Prezidanton Maŭ, kaj kondukos ĝisfine la grandan proletan kulturalan revolucion!

La eksciteco de revolucio skuas nian ĉefurbon kaj ankaŭ la koron de nia popolo je centmilionoj. Sub la sunecaj briloj de la granda nevenkebla penso de Maŭ Zedong, la bonega situacio de la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado de nia lando nun vige disvolviĝas antaŭen kun grandaj saltoj.

*Prezidanto Maŭ kaj kamarado Lin Biaŭ inter junaj revoluciuloj — ruĝaj gvardianoj*



# Prezidanto Maŭ kaj Amaso Kune Grandan

**E**N la 18-a de aŭgusto, Prezidanto Maŭ Zedong, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto, granda direktlisto, partoprenis kune kun la miliona revolucia amaso de Pekino kaj el diversaj lokoj de la tuta lando la grandan mitingon por celebri la grandan proletan kulturen revolucion sur la grandioza Tian-anmen-placo, en la ĉefurbo de nia granda patrolando, en la centro de la proletata revolucio.

Frumatene, je la kvina horo, kiam la suno ĵus sendis siajn radiojn el la orienta horizonto, Prezidanto Maŭ jam venis al la placo, kie etendiĝis maro de homamasoj kaj arbaro de ruĝaj flagoj, kaj intervidiĝis kun la revolucia amaso jam tie kolektiĝinta de ĉiuj direktoj. Prezidanto Maŭ estis en simpla verda armeana uniformo. Sur lia kepo brilis ruĝa stelo. Prezidanto Maŭ transpasis la Orakvan Ponton antaŭ la pordego Tian-anmen, iris rekte inter la homamasojn, manpremis kun multaj homoj en la ĉirkaŭo, kaj mansvingis salute al la revoluciaj amasoj sur la vasta placo. Tiutempe, ekbolis la tuta kunvenantaro; oni alte levis la manojn, saltadis, aklamis kaj varme manklakadis al Prezidanto Maŭ. Ili ĝoje kriis: "Prezidanto Maŭ venas! Prezidanto Maŭ venas al ni!" Sur la placo tondris la miliono per krioj: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu! Vivu longe!" La vivukrioj estis laŭtaj unuj

pli ol la aliaj, kaj skuis la ĉielon super la ĉefurbo.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ restis kun la miliona revolucia amaso dum pli ol ses longaj horoj en la antaŭtagmezo de tiu tago. Dum la revuado al la celebra parado de la miliona armeo de proleta kultura revolucio, Prezidanto Maŭ staris ŝultro ĉe ŝultro kun kamarado Lin Biaŭ, sur la pordego Tian-anmen. Rigardante al la senfinaj vicoj de paradantoj, li ĝoje diris al kamarado Lin Biaŭ: "**Tre granda estas la skalo de tiu ĉi movado; la popolamasoj estas efektive jam mobilizitaj; tio havas tre grandan signifon por la ideologia revoluciigo de la popolo de la tuta lando.**"

Dekmiloj da ruĝaj gvardianoj kun ruĝa rubando ĉirkaŭ la brako, bravaj kaj viglaj, tiris al si aparte atenton en la mitingo. Ruĝaj gvardioj estas revoluciaj amasaj organizoj kreitaj de lernantoj en universitatoj kaj mezlernejoj en la ĉefurbo dum la kampanjo de la granda proleta kultura revolucio. Ĝiaj anoj pretas, dum sia tuta vivo, esti ruĝaj avangardanoj por defendi Prezidanton Maŭ, la Komunistan Partion de Ĉinio kaj la patrolandon. Sur la pordego Tian-anmen, sur la ŝtuparaj altanoj dense staris reprezentantoj de la ruĝaj gvardioj.

Dum la irado de la mitingo, unu ruĝa gvardiano el la Dependata Knabina Mezlernejo



# Miliona Celebris la Kulturan Revolucion

de la Instruista Universitato suriris la pordegon kaj surmetis ĉirkaŭ la brako de Prezidanto Maŭ la rubandan insignon de Ruĝa Gvardio. Prezidanto Maŭ intime manpremis kun ŝi. La ruĝaj gvardianoj sur kaj ĉe la pordego ĝojis senlime, iuj ege emociitaj diris: “Prezidanto Maŭ estas nia ĉefkomandanto kaj ni liaj soldatetoj.” Aliaj aldonis: “Ke Prezidanto Maŭ aliĝis al nia ruĝa gvardio estas por ni plej granda subteno kaj kuraĝigo. Sub la apogo de Prezidanto Maŭ, ni nenion timas.”

1500 reprezentantoj de lernantoj suriris la pordegon por partopreni la mitingon kune kun la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj. Prezidanto Maŭ kaj kamaradoj Lin Biaŭ, Ĝoŭ Enlaj, Giang King k. a. akceptis ilin pogrube, kaj interparolis kaj fotografiĝis kun ili. Kiam Prezidanto Maŭ akceptis ilin, la gelernantoj entuziasme ĉirkaŭis la amatan Prezidanton Maŭ kaj daŭre kriadis laŭte: “Vivu Prezidanto Maŭ!”

La celebra mitingo komenciĝis je duono post la sepa atm. En la muzikado de *Ruĝas la Oriento*, Prezidanto Maŭ kaj kamarado Lin Biaŭ k. a. aperis sur la pordego. Tiam ĝojegis kaj saltis la homamasoj sur la placo; sennombraj brakoj kun ruĝkovrila libreto *Ciitaj Vortoj de Prezidanto Maŭ* en la manoj etendiĝis al la pordego Tian-anmen; miliono

da ardaj koroj flugis al Prezidanto Maŭ kaj miliono da okulparoj brilantaj de revolucia pasio rigardis supren al Prezidanto Maŭ.

Vidante ke la amata Prezidanto Maŭ portas sur si simplan armeanan uniformon, iuj diris kun ankoraŭ pli da emocio: “Ke Prezidanto Maŭ sin vestas per armeana uniformo, el tio ni sentas pli multan intimecon. Prezidanto Maŭ batalas por ĉiam kune kun ni.” Aliaj diris: “Havante tian plej altan ĉefkomandanton, kia Prezidanto Maŭ, ni sentas senliman feliĉon. Dum nia tuta vivo, ni estos bonaj batalantoj de Prezidanto Maŭ, kaj faros revolucion kune kun Prezidanto Maŭ.”

La celebran mitingon prezidis kamarado Ĉen Boda, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPC kaj estro de la Grupo pri Kultura Revolucio de CK. Malfermante la mitingon, li diris: “Nia granda gvidanto, granda instruanto, granda direktivisto Prezidanto Maŭ intervidiĝas hodiaŭ ĉi tie kun vi ĉiuj. (La amaso varme akklamis al Prezidanto Maŭ) Prezidanto Maŭ estas ĉiam kun la amaso. Al la amaso lia koro ĉiam direktas sin. Nia nuna granda proleta kultura revolucio estas gvidata persone de Prezidanto Maŭ. Lia intervidiĝo kun vi hodiaŭ multe kuraĝigas nin kaj ege puŝos antaŭen la grandan kulturan revolucion.”

Poste, kamarado Lin Biaŭ paroladis en ŝtormo de manklakado.

En la nomo de Prezidanto Maŭ kaj CK de la Partio, kamarado Lin Biaŭ salutis la popolamason.

Kamarado Lin Biaŭ diris:

“La granda proleta kultura revolucio elmetita de Prezidanto Maŭ estas granda iniciato en la komunisma movado kaj granda iniciato en la socialisma revolucio!

“La granda proleta kultura revolucio celas elimini la burĝan ideologion kaj starigi la proletan, transformi la animon de homoj, efektiviĝi la revoluciigon de la homa ideologio, elfosi la radikon de reviziismo, firmigi kaj disvolvi la sistemon de socialismo.

“Ni devas faligi la potenctenantojn, kiuj iras la kapitalisman vojon, faligi la reakciajn burĝajn aŭtoritatulojn kaj ĉiujn rojalistojn de la burĝaro, oponi kontraŭ diversspecaj agoj subpremantaj la revolucion kaj faligi ĉiujn demonojn kaj diablojn!

“Ni devas plene disrompi ĉiujn malnovajn ideojn, kulturon, morojn kaj kutimojn de la ekspluataj klasoj kaj reformi ĉiujn aferojn de la superstrukturo kiuj ne konformas al la socialisma ekonomia bazo. Ni devas forbalai ĉiajn malutilajn vermojn kaj forigi ĉiajn obstaklojn!

“Ni devas plene starigi aŭtoritatecon de la proletaro kaj la proletajn novajn ideojn, kulturon, morojn, kutimojn, unuvorte, la penson de Maŭ Zedong. Ni devas igi centmilionojn da popolo posedi la penson de Maŭ Zedong, lasi la penson de Maŭ Zedong okupi ĉiujn poziciojn en la ideologia tereno, uzi la penson de Maŭ Zedong por ŝanĝi la spiritan fizionomion de la tuta socio, kaj lasi la penson de Maŭ Zedong, tiun grandan forton de spirito, turniĝi en grandan forton de materio!

“La nuna granda kultura revolucio estas grava afero kiu koncernas la sorton kaj estontecon de nia partio kaj ŝtato!

“Sur kion ni apogu nin por sukcesigi tiun ĉi grandan kulturalan revolucion? Sur la grandan penson de Maŭ Zedong, sur la saĝon kaj forton de la amaso!”

Kamarado Lin Biaŭ diris: “Kiam ni havas la saĝan gvidon de Prezidanto Maŭ kaj posedas

la plej akran batalilon, la penson de Maŭ Zedong, ni povas antaŭenmarŝi nerezisteble, ĉion konkeri senescepte kaj atingi ĝisfundan sukceson de la granda proleta kultura revolucio!”


Kamarado Lin Biaŭ diris: “Ni devas lanĉi fortan atakon kontraŭ la burĝa ideologio, malnovaj moroj kaj la fortoj de malnovaj kutimoj, sub la gvido de Prezidanto Maŭ! Ni devas komplete faligi kaj kolapsigi la kontraŭrevoluciajn reviziismajn elementojn, la destruktrulojn de la burĝaro kaj la reakciajn burĝajn aŭtoritatulojn, por ke ilia prestiĝo plene ruiniĝu por ĉiam nereturneble.”

Tuj poste paroladis kamarado Ĝoŭ Enlaj en la mitingo. Li diris: “La Centra Komitato de la Partio ĵus finis sian 11-an Plenan Sesion, kiu iris sub la persona prezido de Prezidanto Maŭ. Ĝi estis sesio kun granda historia signifo. Kaj ĝia sukceso estas nova venko de la penso de Maŭ Zedong.

“La 16-punkta Decido akceptita dum la sesio estas ellaborita sub la persona gvido de Prezidanto Maŭ kaj estas la programo de la granda proleta kultura revolucio. Ĉiuj revoluciaj kamaradoj devas ĝin studi, koni, ellerni kaj apliki serioze. Ĝi estas armilo por la batalo en nia granda proleta kultura revolucio kaj orientilo por nia agado. Ni nepre devas bone ellerni kaj apliki tiun ĉi grandan programon kaj penetrigi ĝin en nian praktikan agadon.

“En la granda proleta kultura revolucio, ni devas plene disrompi la ideologion de la burĝaro kaj plene starigi la ideologion de la proletaro, t. e. la penson de Maŭ Zedong. Navigadon en maro oni dankas al la direktilisto. Nia granda direktilisto estas Prezidanto Maŭ. Ni devas respondi al la alvoko de kamarado Lin Biaŭ por plue disvolvi la amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ en la tuta Partio, tuta armeo kaj tuta lando.

“Ni nepre devas alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, por konduki ĝisfine la grandan proletan kulturalan revolucion, konstrui la socialisman Ĉinion en feran, nedetruublajn landon de proletaro kaj plenumi nian gloran historian mision asignitan de la popolo de Ĉinio kaj la revolucia popolo de la mondo.”



*Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj Ŝtato celebras la deksepan datrevenon de la fondiĝo de la respubliko kune kun la revolucia amaso de 1,500,000 personoj.*

Dum kamaradoj Lin Biaŭ kaj Ĝoŭ Enlaj paroladis, la miliona amaso sur la placo ree kaj ree kriis kun levitaj brakoj: “Vivu la granda proleta kultura revolucio!” “Vivu la granda Komunista Partio de Ĉinio!” “Vivu la granda penso de Maŭ Zedong!” “Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ! Vivu! Vivu longe!”

En la mitingo paroladis sinsekve ankaŭ la reprezentantino de Pekina Universitato Nie Juanzi kaj studentoj kaj mezlernejoj el Pekino, Harbin, Ĉangŝa, Nankino kaj aliaj lokoj. Kun senlime profunda kaj senlime sincera amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj kun la ŝtala volo de milionoj kaj dekmilionoj da revoluciaj instruistoj kaj lernantoj en la tuta lando konduki ĝisfine la grandan proletan kulturalan revolucion, ili decidis transpreni la penson de Maŭ Zedong kaj heredigi ĝin de generacio al generacio por certigi ke nia fera socialisma lando neniam ŝanĝos sian koloron. Ili diris:

“Sub la direktado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, nun iras en nia lando senprecedenca granda proleta kultura revolucio, kiu estas revolucio kun monda signifo. Ni devas nepre frakasi la malnovan mondon kaj krei novan, kaj konduki ĝisfine tiun revolucion.”

“Navigadon en maro oni dankas al la direktlisto; ĉiuj vivaĵoj kreskas dank’ al la suno; tio, al kio oni dankas la irigon de revolucio, estas la penso de Maŭ Zedong. Ni tutkore deziras al la plej, plej amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ senlime longan vivon. Ni nepre aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ, prizorgos la ŝtatajn aferojn, kaj kondukos ĝisfine la grandan proletan kulturalan revolucion. Ni nepre sekvos la instruojn de Prezidanto Maŭ, hardos kaj spertigos nin en ŝtormoj kaj ondegoj por esti plej fidindaj daŭrigantoj por la afero de proleta revolucio.”

“Prezidanto Maŭ estas la plej, plej ruĝa suno en niaj koroj. La revolucio de la ĉina popolo neniam iris en kvieto sen ventoj kaj ondoj. Ni devas teni en nia memoro la instruon de Prezidanto Maŭ kaj nin hardi kaj provi en ŝtormoj kaj ondegoj. Ni ĵuras defendi per nia vivo la Centran Komitaton de la Partio

kaj Prezidanton Maŭ. Antaŭ ni estas monto de bajonetoj kaj maro de fajro, tamen ni havas ankaŭ la helan lumturon de la penso de Maŭ Zedong. Sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong, ni certe venkos.”

“Prezidanto Maŭ nun staras ĉe ni. Tiu momento estas la plej grava kaj plej feliĉa horo en nia tuta vivo. Ni devas dum la tuta vivo legi la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ, agi laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, kaj esti bonaj lernantoj de Prezidanto Maŭ.”

La paroloj de revoluciaj lernantoj el diversaj lokoj, plenaj de revolucia emocio, vekis tondrajn manklakojn sur Tian-anmen-placo dum longa tempo.

Post kiam finiĝis la celebra mitingo, la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de universitatoj kaj mezlernejoj de la ĉefurbo kaj el diversaj lokoj de la lando, laboristoj, kamparanoj, komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo kaj kadroj de diversaj institucioj en Pekino ĉiuj vigle marŝis kun alta batalvolo kaj senlima entuziasmo tra Tian-anmen-placo por esti revuataj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ĉi tie ili esprimis al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio sian firman subtenon al la Decido de la Centra Komitato de la Partio pri la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Komuniko de la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio kaj neflekseblan pretecon fariĝi aŭdacaj pioniroj de la granda proleta kultura revolucio kaj konduki ĝisfine la grandan proletan kulturalan revolucion kaj la socialisman revolucion.

Prezidanto Maŭ kaj kamaradoj Lin Biaŭ, Ĝoŭ Enlaj k. a. staris sur la pordego Tian-anmen revuis la paradantojn, kaj de tempo al tempo svingis siajn manojn salute al la miliona revolucia amaso. En la celebra parado, Prezidanto Maŭ kaj kamaradoj Lin Biaŭ k. a. plurfoje manklakis de sur la pordego al la miliona amaso sur la placo. La amaso foje refoje kantis laŭte la kanton *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktlisto* kaj ĝojkriis ripete kaj ripete: “Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu! Vivu longe!”

# Ĉiuj Ruĝaj Koroj Inklinas al la Suno

## Prezidanto Maŭ Venas ĉe Nin

En la 18-a de oktobro, la ruĝa disko de l' suno leviĝis el la oriento, kaj la tutan Pekinon banis la brila sunlumo. Prezidanto Maŭ, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ revuis la kvaran fojon, veturante en senkovraj aŭtomobiloj, kune kun aliaj respondeculoj de CK de la Partio, la ruĝajn gvardianojn kaj revoluciajn instruistojn kaj lernantojn, kiuj venis el diversaj lokoj de la lando en nombro de 1,500,000.

Precize je 50 minutoj post la 12-a horo, en la tagmezo, eksonis la majesta muziko de *Ruĝas la Oriento*. Vico da senkovraj aŭtomobiloj, tute novaj, rapidis al la porrevuaj stratoj en ruĝo kun totala longeco de 25 kilometroj, kondukate de grupo da motorbicikloj irantaj en la formo de sagginto.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en verda armeana uniformo kaj kun radianta mieno staris sur la unua senkovra aŭto kaj aperis antaŭ la ĝojkriantaj amasoj.

Starante sur la dua senkovra aŭto, en vigla spirito, kamarado Lin Biaŭ tuj sekvis Prezidanton Maŭ kaj kune kun li revuis la grandan armeon de la kultura revolucio.

La revoluciaj amasoj sidantaj surtere ĉe ambaŭ flankoj de la aŭto-vojo svingis la ruĝajn libretojn *Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ*, kvazaŭ miloj kaj milionoj da ruĝaj revoluciaj koroj flugas al Prezidanto Maŭ, nia plej estimata kaj amata gvidanto.

“Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu! Vivu longe!”  
La ĝojkrioj tondris tra la tuta urbo Pekino.

Hodiaŭ, la ruĝaj gvardianoj el Jangi-gubernio, Gilin-provinco, enviciĝintaj antaŭ la norda enirejo de la Popola Halo, fariĝis la plej feliĉaj homoj en la mondo. Prezidanto Maŭ venis unue al ili. Larmoj de emocio vualis iliajn okulojn, kaj bolanta sango trakuris iliajn korpojn. Ili havis milojn da vortoj en siaj koroj sed nun povis nur kunmeti ilin en la aklamon: “Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu longe!”

Tiuj ĉi ruĝaj gvardianoj de korea nacio atingis Pekinon nur je la 17-a de okt. Fru-matene hodiaŭ, ili surmetis la medalojn kun la

portreto de Prezidanto Maŭ surbruste, donacitajn de ruĝaj gvardianoj de la ĉefurbo, venis al Tian-anmen-placo kaj vidis Prezidanton Maŭ, al kiu ili tag-nokte sopiris. Ili diris: “Prezidanto Maŭ tiel bone fartas. Tio estas la granda feliĉo de la popolo de diversaj nacioj de nia lando.”



La pli ol 5,800 revoluciaj instruistoj kaj lernantoj venintaj el la regiono de Gínggang-monto, ankaŭ plej frue vidis Prezidanton Maŭ hodiaŭ. Antaŭ ilia ekveturo, la amaso de tiu malnova revolucia bazloko ripete diris al ili: “Prezidanto Maŭ plej zorgas pri la amaso kaj plej fidas al la amaso, ni, popolanoj de Gínggang-monto, sopiras al Prezidanto Maŭ kaj kore inklinas al li.” Jin Gen, maljuna ruĝa gvardiano de Jonghin-gubernio pli ol sesdek-jara, diris al sia filo Jin Venhian: “Tiam Prezidanto Maŭ, nia amata, ofte venis al Jonghin. Li surportis pajsandalojn, manĝis starante kune kun ni, kaj gvidis nin batali kontraŭ lokaj tiranoj kaj distribui agron. Ĉifoje vi iros al Pekino, nepre transdonu niajn salutojn al Prezidanto Maŭ kaj post la reveno rakontu al ni la detalojn pri via intervidiĝo kun Prezidanto Maŭ.” Hodiaŭ, vidinte Prezidanton Maŭ, Jin Venhian diris kun ekscitiĝo: “La revolucia popolo de la malnova generacio en la regiono de Gínggang-monto, ricevis kuraĝigon de Prezidanto Maŭ en la plej malfacilaj tagoj kaj persistadis en batalo. Ni nepre sekvos ilian ekzemplon kaj decideme kondukos la socialisman revolucion ĝis la fino sub la direktado de Prezidanto Maŭ.”

Forpasis ĝuste du monatoj ekde la 18-a de aŭgusto, kiam Prezidanto Maŭ la unuan fojon akceptis la grandan armeon de la kultura revolucio ĉe la pordego Tian-anmen, ĝis hodiaŭ. Dum tiuj du monatoj Prezidanto Maŭ kvarfoje akceptis la revoluciajn amasojn, kaj en la Nacia Tago revuis ankaŭ la paradantaron kiu konsistis el reprezentantoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj el la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj. La grandnombreco de la amaso kaj la imponeco de la atmosfero estis senprecedencaj ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ

en la mondo. Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun tiel grandega amaso, li persone iris en la amason kaj kunestis kun ili. Prezidanto Maŭ estas la plej brila ekzemplo de la tuta Partio en kontaktiĝo kun la amaso. Multaj ruĝaj gvardianoj emociite diris: “Prezidanto Maŭ multfoje akceptis la revolucian amason ne evitante laciĝon, tio estas grandega kuraĝigo por la tutlanda popolo kaj grandega antaŭenpuŝo al la granda proleta kultura revolucio.”

### La Koroj de Centmilionoj da Popolanoj Inklinas al Prezidanto Maŭ

“Prezidanto Maŭ venas!” “Prezidanto Maŭ venas!”

Tondrado de ĝojkrioj sur la 25-km. longa ruĝa vojo skuis la teron. Oni svingadis la ruĝajn libretojn *Cititaj Vortoj de Prezidanto*



*Prezidanto Maŭ mansalutas la ruĝajn gvardianojn kaj revoluciajn instruistojn kaj lernantojn.*

Maŭ kaj hurais “Vivu Prezidanto Maŭ!” Kun vizaĝoj esprimantaj ekscitecon kaj okuloj brilantaj de ardeco, ĉiuj direktis sian rigardon antaŭen al la senfina aŭtomobila vojo.

Aparte senpaciencaj estis la gelernantoj de la tria mezlernejo “Ruĝas la Oriento” de Ŝanhajo. Kiam ili aŭdis sur vagonaro en la 17-a la ĝojigan sciigon, ke Prezidanto Maŭ denove akceptos revoluciajn instruistojn kaj lernantojn, ili malkontentis pro tromultaj haltoj de la vagonaro ĉe diversaj stacioj kaj pro la tro longa tempo de veturado, timante ke ili ne povos ĝustatempe kapti la grandan okazon. Frumatene hodiaŭ, tuj post la elvagoniĝo, zorgante nek manĝon, nek loĝejon, ili rekte venis al la vicoj por esti revuataj. Kiam ili fine sukcesis vidi Prezidanton Maŭ, unu ruĝa gvardiano el ili skribis en sian libreton *Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ* la jenon: “La 18-an de oktobro, 1966, je 3 minutoj post la 1-a

posttagmeze, Prezidanto Maŭ venis al ni, kaj fine mi vidis Prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton al kiu mi sopiras tag-nokte. Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu, vivu longe!”

Prezidanto Maŭ, starante sur la revua aŭto, senĉese salutis la amason per mansvingado, tiel ke la amaso des pli bolis pro ĝojo. Ne nur kiel individuoj ili vidis Prezidanton Maŭ, ĉar ĉiu el ili reprezentis multegon da homoj. Granda parto el la revolucia amaso, ĉifoje revuata, estis elektitaj reprezentantoj de mezlernejoj en diversaj lokoj de la lando. Post kiam la reprezentantoj de la mezlernejoj en Ŝuangliu-gubernio, Siĉuan-provinco, estis elektitaj, la tieaj laboristoj diris: “Ili estas niaj reprezentantoj!” La barbiroj multege sin okupis por tondi iliajn harojn. La laboristoj de la nutraĵa fabriko produktis por ili sekmanĝaĵojn. La ŝoforoj faris ornamojn al siaj aŭtoj por sendi ilin al la vojaĝo. Kiam ili esprimis



*Venas Prezidanto Maŭ en aŭto! La ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj levas la ruĝe brilan libreton. Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ, krias laŭte: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu, vivu longe!"*

dankemon pro la subteno kaj helpo de la laboristoj, tiuj ĉi diris: "Ne diru dankon. Kiam vi venos al Tian-anmen-pordego, krii multfoje por ni 'Vivu Prezidanto Maŭ!' por deziri al li longan, longan vivon!"

Kiam tiuj ĉi revoluciaj lernantoj alvenis al Pekino kun bondeziroj de la tutlanda popolo, la unua afero, kiun ili faris post elvagoniĝo, estis iri al la pordego Tian-anmen. Pli ol mil revoluciaj lernantoj el Hajnan-insulo venis al Tian-anmen-placo, vidis la grandan portreton de Prezidanto Maŭ kaj longtempe staris tie ne volante foriri. Karesante la balustradon de la Orakva Ponto iuj diris: "Prezidanto Maŭ certe iam tuŝis la balustradon ĉi tie." Aliaj

sidiĝis sur la ponto kie Prezidanto Maŭ sidis, kaj ili diris emociite: "Mi nun sidas apud Prezidanto Maŭ." La triaj esperis, ke Prezidanto Maŭ subite aperus sur la pordego Tian-anmen. La kvaraj esperis, ke Prezidanto Maŭ subite elirus salutante ĉiujn per mansvingado. Nun Prezidanto Maŭ efektive venis al ili kaj mansvingis al ili, kiel ili povis ne ĝojkrii per sia tuta koro?

Kiam la aŭtomobilo de Prezidanto Maŭ ankoraŭ estis fore, oni atendis treege senpaciencaj kaj sentis, ke la aŭtomobilo veturas tro malrapide. Ĉiuj deziris: Ha! Aŭto, rapidu, rapidu al ni, por ke ni plifruue vidu Prezidanton Maŭ.



Sed en la momento, kiam la aŭtomobilo de Prezidanto Maŭ preterpasis, oni sentis, ke la aŭtomobilo veturas tro rapide. Ĉiuj deziris: Ha! Aŭto, malrapide, iru malrapide for de ni, por ke ni plilonge vidu Prezidanton Maŭ.

Jam for estis la aŭtomobilo de Prezidanto Maŭ, oni ankoraŭ entuziasme parolis pri la senkompara feliĉo, ke ili jam vidis Prezidanton Maŭ. Unu studento de la Gianghi-a Komunisma Labora Universitato eldiris la elkorajn vortojn de ĉiuj: "Kvankam la momento estis tre mallonga, kiam Prezidanto Maŭ iris preter ni, tamen tiu estos momento neniam forgesebla dum la tuta vivo."

## Antaŭenmarŝi laŭ Vojo Malfermita de Prezidanto Maŭ

Je iom pli ol 50 minutoj post la 1-a posttagmeze, Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ atingis la finan punkton de la revuado, kaj mansvingante salutis la revolucion amason ĉirkaŭe.

La amaso, staranta ambaŭflanke de la granda vojo, ĝojkriis ĝis la kulmino. Ili neniel povis sin deteni de la sento de ekstrema ekscitiĝo kaj ekstrema feliĉo. Kun dolĉa memoro ili ne volis tuj forlasi la lokon.

Dum kelka tempo post kiam pasis la aŭtomobilo de Prezidanto Maŭ, iu juna ruĝa gvardiano el orienta Ĉinio ankoraŭ levis la kapon kaj rigardis la forveturantan aŭtomobilon, kriante per sia tuta gorĝo: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu longe!" Apudstaranto diris al ŝi: "Prezidanto Maŭ jam foriris." Ŝi certigis: "Ne, Prezidanto Maŭ restas kun ni por ĉiam."

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ plej fidas al la amaso, plej sin apogas sur la amaso kaj plej estimas la iniciativon de la amaso. Prezidanto Maŭ havas la saman spiron kaj sorton kun la amaso kaj por ĉiam interligiĝas koro al koro kun la amaso.

En tiu ĉi granda proleta kultura revolucio, estas Prezidanto Maŭ, kiu plej firme subtenas

la revolucion batalon de la amaso kaj plej firme subtenas la iniciativon de la amaso.

Kiu subtenis la revolucionajn instruistojn kaj studentojn de la Pekina Universitato, kiam la unua grand-ideografia opiniafiŝo en tiu universitato ĵus aperis kaj renkontis atakon de la potencotenantoj irantaj la kapitalisman vojon? Estis neniu alia ol nia granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ.

Kiu subtenis la ruĝajn gvardiojn, kiam ili ĵus burĝonis kaj suferis sufokon fare de iuj personoj? Estis neniu alia ol nia granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ.

Dum tre mallonga periodo de kelkaj monatoj, la revolucionaj opiniafiŝoj algluiĝis ĉie en grandaj kaj malgrandaj urboj de la tuta lando, kaj la ruĝaj gvardioj sin disvolvis en mondkuan revolucion armeon de la vasta amaso. La granda movado de la granda proleta kultura revolucio skuis la tutan socion kaj la tutan terglobon. Ĉiuj demonoj kaj diabloj, kiuj vidis la revolucionajn opiniafiŝojn kaj ruĝajn gvardianojn, tremitiĝis. Tiuj, kiuj timas la amason kaj la revolucion, ankaŭ sentas sin maltrankvilaj.

Kiu subtenis la vastan interkontakton de la revolucionaj instruistoj kaj lernantoj? Estas ankaŭ neniu alia ol nia granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ.

Dum tre mallonga periodo de kelkaj monatoj, la granda revolucionaria interkontakto jam fariĝis unu el la plej bonaj rimedoj de la lernantoj kaj studentoj por eduki sin mem. En tia interkontakto ili distingas la pravon de la malpravo, bone konas la socion, la amason kaj la klasbatalon, kaj kunigas la grandan kulturen revolucion de la tuta lando en unu tuton, ebligante sin esti ĉiufleke harditaj en la granda revolucionaria fornego de interkontakto kaj rapide kreski.

Inter la revolucionaria amaso veninta de aliaj lokoj al Pekino kaj akceptita hodiaŭ, troviĝis multaj revolucionariaj lernantoj, kiuj estas avangardanoj en la batalo kontraŭ la potencotenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon kaj kontraŭ la reakcia linio de la burĝa klaso.

Ili longe travivis subpremon, sed ili persistis en batalado kaj ŝanĝis la situacion.

Kiu donis al ili kuraĝon kaj forton? Estas nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Hodiaŭ la ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj venintaj el diversaj lokoj de la lando ricevis la revuon de Prezidanto Maŭ, tial plialtiĝis ilia batalspirito kaj pligrandiĝis ilia kuraĝo. Multaj ĵuris: "Ni nepre devas firme defendi kaj efektivi la proletan revolucion linion kun Prezidanto Maŭ kiel reprezentanto, kaj nepre devas ĝisfunde kritiki la burĝan reakcian linion."

Kelkaj ruĝaj gvardianoj venintaj el la regiono de Zunji diris: Prezidanto Maŭ, nia granda direktilisto, klare montras al ni la direkton en ĉiu decidiga momento de la revolucio. Post kiam la Zunji-Kunveno certigis la korektan linion reprezentatan de Prezidanto Maŭ, la ĉina revolucio jam iris senhalte de venko al venko. Hodiaŭ Prezidanto Maŭ persone gvidas la grandan proletan kulturen revolucion kaj gvidas nin batali kontraŭ la burĝa reakcia linio. Ni kuraĝe antaŭeniru laŭ la revolucia vojo malfermita de Prezidanto Maŭ, kaj ni certe povos sukcese plenumi la historian mision de la granda kultura revolucio.

*Prezidanto Maŭ, la plej ruĝa, plej ruĝa suno en niaj koroj. Ni sopiris vin vidi tagnokte, kaj hodiaŭ realiĝas fine nia bela revo.*



# Parolado de K-do Lin Biau

en la 17-jara Festkunveno  
de Ĉina Popola Respubliko

## Geamikoj kaj gekamaradoj:

Hodiaŭ estas la granda festotago de la 17-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. En la nomo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, de la Centra Komitato de la Partio kaj de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko, mi esprimas plej varman saluton al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj en la tuta lando, al la revoluciaj ruĝaj gvardianoj kaj aliaj batalantaj junulaj kaj infanaj organizoj, al la revoluciaj popolanoj de diversaj naciecoj kaj revoluciaj kadroj de la tuta lando! kaj elkoran bonvenigon al la geamikoj el diversaj landoj de la mondo!

La 17 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko estis 17 jaroj neordinaraj. Ili estis 17 ĉielorenversaj jaroj, tiel en nia lando, kiel ankaŭ en la mondo.

Kamarado Maŭ Zedong gvidas nian popolon en kondukado de la revolucio tra zigzaga vojo plena de penadoj kaj malfaciloj. La malamikoj en- kaj ekster-landaj estis fortaj, sed ili estas fine faligitaj kaj forpeltitaj de la ĉina popolo. La imperiistoj, estrataj de Usono, la reakciuloj kaj la modernaj reviziistoj — tiuj paperaj tigroj estas ĉiuj trapikitaj de la ĉina popolo kaj aliaj revoluciaj popoloj de la diversaj landoj.

En 17 mallongaj jaroj, la ĉina popolo tute ŝanĝis sian antaŭan fizionomion. Tio estas grandega merito kaj atingo de la ĉinaj popolamasoj sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong. Ni kredas ke ĉiuj subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo, same kiel la ĉina popolo, iros respektive sian propran vojon konforme al la cirkonstancaro de sia lando kaj konkeros la finan venkon.

Hodiaŭ ni celebras la grandan festotagon en la alta tajdo de la granda proleta kultura revolucio. Tiu granda proleta kultura revolucio estas kreiva granda revolucio tute nova de speco, kondukata post kiam la proletaro jam kaptis al si la regpotencon. Tiu granda revolucio celas renversi tra batalo plenmanon da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la vojon de kapitalismo, forbalai ĉiujn demonojn kaj diablojn en la socio, elimini la kvar malnova-ojn\* de la ekspluatitaj klasoj kaj starigi la kvar nova-ojn\* de la proletaro por plie solidigi la proletan diktaturon kaj disvolvi la socialisman sistemon. La historia sperto de la proleta diktaturo internacia diras al ni, ke estus aperontaj superregado de moderna reviziismo kaj restariĝo de kapitalismo, se ni ne tiel farus. En nia lando, tiuokaze, ni estus reirontaj al la malnova vojo de kolonio kaj duonkolonio,



*Kamarado Lin Biaŭ parolas en la soleno de 17-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.*

de feŭdismo kaj duonfeŭdismo, kaj la imperiismo kaj reakciuloj estus ree rajdontaj sur la nuko de la popolo. La graveco de tiu nia granda kultura revolucio estas tre evidenta.

Nun, la popolamasoj en centmilionoj estas mobilizitaj. La revolucia popolo disetendas siajn brovojn kaj spiras libere, dum la prestiĝo de la reakciaj burĝoj estas plene faligita. Ni estas marŝantaj antaŭen. Ni jam fundamentis la situacion de granda venko.

La granda proleta kultura revolucio akcelas la revoluciigon de homa ideologio kaj tial ĝi fariĝas potenca movforto por la disvolvo de la socialisma produktado de nia lando. La kuranta estas la unua jaro de

la Tria Kvinjara Plano. La produkta plano de la industrio de la jaro povas esti superplenumita laŭ antaŭkalkulo, kaj oni antaŭvidas novan bonan rikolton en la agrikulturo. Niaj scienco kaj tekniko estas en konkerado de novaj pintoj. Neniam antaŭe nia granda patrolando estis en tia prospero kaj en tia viva kaj vigla stato. Neniam nia nacia defendo estis tiel forta.

Prezidanto Maŭ jam antaŭ longe montris, ke ekzistas la klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro kaj la batalo inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo, dum la tuta historia periodo de socialismo. La granda proleta kultura revolucio estas nova stadio de la batalo inter la du klasoj kaj du vojoj. Dum la granda proleta kultura



*Sur Tian-anmen, kamarado E. F. Hill petas Prezidanton Maŭ doni sian aŭto-grafon al la libreto Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ en angla traduko.*

revolucio, ankoraŭ daŭras la batalo inter la revolucia linio de la proletaro, reprezentata de Prezidanto Maŭ, kaj la burĝa linio kontraŭstara al la revolucio. Estas nur plenmano da personoj kiuj obstinas en sia erara linio. Ili apartigas sin de la popolo kaj staras kontraŭ la popolo kaj la penso de Maŭ Zedong, kaj tio destinas, ke ili nepre fiaskos.

Gekamaradoj kaj geamikoj: Nun la mondo troviĝas en tre bona situacio. La granda skuiĝo de la mondo dum la lastaj kelkaj jaroj montras ke la tagoj de la imperiistoj, estrataj de Usono, la modernaj reviziistoj kaj la reakciuloj de diversaj landoj ne estos longaj.

La usona imperiismo klopodas trovi eliron pere de eksplodigo de mondmilito. Tion ni devas serioze trakti. La fokuso de la nuna batalo troviĝas en Vjetnamio. Ni

estas pretaj ĉiurilate. Ni decidis sendomaĝe fari plej grandan nacian oferon por firme subteni nian fratan vjetnaman popolon konduki sian naciŝan militon kontraŭ la usona imperiismo ĝis la fino. La imperiistoj, estrataj de Usono, kaj la modernaj reviziistoj, kun la gvidantaro de KPSU kiel sia centro, nun komplotas inter si kaj aktive intrigas pri la trompo per paca intertraktado kun la celo estingi la flamojn de la naci-revolucia milito de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo kaj tiujn de la naci-revoluciaj militoj de diversaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj tiujn de la mondrevolucio. Se la popolo de la tuta mondo nur akriĝos sian vidon, ilia intrigo neniel povos sukcesi. Prezidanto Maŭ diris antaŭ 20 jaroj, ke la popolo de la tuta mondo devas formi unuecfroton kontraŭ la usona imperiismo por ĝin venki. La re-

voluciaj popoloj de diversaj landoj de la mondo nun marŝas antaŭen laŭ tiu vojo.

Prezidanto Maŭ diris:

*La popolo de la tuta mondo havu kuraĝon, aŭdacu batali, timu neniajn malfacilojn kaj marŝu antaŭen unuj sekvante aliajn; tiam, la tuta mondo certe apartenos al la popolo. Ĉiuj demonoj estos senescepte ekstermitaj.*

Nepre tia estos la estonteco de la mondo.

La ĉina popolo plue tenos alte la standardon de marksism-leninismo kaj la standardon de proleta internaciismo kaj luktos ĝis la fino, kune kun la marksist-leninistoj de la tuta mondo kaj la revoluciaj popoloj de ĉiuj landoj, kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj kontraŭ la moderna reviziismo, kun la gvidantaro de KPSU kiel sia centro!

Gekamaradoj kaj geamikoj!

Ĉiuj niaj atingoj kaj sukcesoj estas akiritaj sub la sagaca gvido de Prezidanto Maŭ kaj estas sukcesoj de la penso de Maŭ Zedong. Ni volas unuigi la penson de la

tuta Partio kaj de la popolamasoj de la tuta lando per la penso de Maŭ Zedong. Ni nepre alte tenos la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj plue disvolvos la amasan movadon de kreiva studado kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Ni turnos la tutan landon en grandan lernejon de la penso de Maŭ Zedong. Ni konstruos nian patrolandon pli potenca kaj pli prospera. Tio estas la bezono de nia popolo kaj ankaŭ la espero, kiun la popoloj de diversaj landoj de la mondo havas sur ni.

Vivu la popolanoj de diversaj naciecoj de Ĉinio!

Vivu la granda unuiĝo de la monda popolo!

Vivu la Ĉina Popola Respubliko!

Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!

Vivu! Vivu! Vivu longe la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

*\*Temas pri malnovaj kaj novaj ideoj, kulturo, moroj kaj kutimoj respektive.*

*Revoluciaj gejunuloj de diversaj naciecoj de nia lando decidis por ĉiam sekvi Prezidanton Maŭ kaj hardi sin kaj kreski en ŝtormoj de revolucio.*



*Granda Venko de la Penso de Maŭ Zedong*  
*Brila Frukto de la Granda Kultura Revolucio*

# Ĉinio Sukcesis en Provo de Pafo de Telestirata Misila Nuklea Armilo

**L**A 27-an de oktobro 1966, Hinhua Novaj-agentejo publikigis jenan informan komunikon:

Je la 27-a de oktobro 1966, Ĉinio sukcese faris sur sia propra teritorio provon de telestirata misila nuklea armilo. La telestirata misilo flugis normale, kaj la nuklea kapo precize trafis la celajon en difinita distanco kaj efektivigis nuklean eksplodon.

Tiu ĉi sukcesa provo markas, ke la scienco, tekniko kaj nacidefenda forto de Ĉinio estas progresantaj en pligranda rapideco sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong. Tio estas alia nova grava atingo de la ĉina popolo en la plua plifortigo de

nacia defendo kaj gardo de la sekureco de sia patrolando kaj la paco de la mondo.

La kompletan sukceson de tiu ĉi provo garantiis la Ĉina Popola Liberiga Armeo, sciencaj-teknikaj laborantoj kaj vastaj amasoj de oficistoj kaj laboristoj, kiuj, entuziasme respondante al la alvoko de kamarado Lin Biaŭ kaj alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, elstarigis politikon, kreive studis kaj kreive aplikis verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj, sub la antaŭenpuŝo de la granda proleta kultura revolucio, firme tenis la revolucion kaj stimulis la produktadon, kaj disvolvis la spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj, de strebo al potenciĝo, de

kolektiva saĝo kaj kolektiva penado kaj de plenforta kunlaboro. Tio estas granda venko de la penso de Maŭ Zedong. Tio plene pruvas ke, kiam la penso de Maŭ Zedong estas posedata de la amaso, ĝi povas naski gigantan materian forton kaj elvolvi sian senkompare grandan potencon.

La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Ŝtata Konsilantaro kaj la Komisiono pri Militaj Aferoj de CK de KPĈ esprimas varman gratulon al ĉiuj komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, kiuj partoprenis en tiu ĉi provo, kaj al la laboristoj, inĝenieraj-teknikaj laborantoj, sciencistoj kaj ĉiuj aliaj personoj kiuj kontribuis al la disvolvo de telestirataj misiloj kaj nukleaj armiloj de nia lando, alte laŭdas ilian novan atingon en la kreiva studado kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj esperas, ke ili daŭre pliiĝos la penadon, persiste kaj senlace, levos sian studon de verkoj de Prezidanto Maŭ al nova stadio, venigos ĝin al nova situacio kaj pluapasa antaŭen-puŝos la revoluciigon de homa penso, kaj ke ili atingos novajn ankoraŭ pli grandajn sukcesojn en la batalo por plua fortigo de la nacidefenda konstruado de nia lando kaj realigo de la modernigo de nia nacia defendo.

Nuntempe, la impeiistoj estrataj de Usono kaj la reviziistoj kun la gvidantoj de

la Komunista Partio de Sovetunio kiel la centro, komplotas inter si mano en mano, intensigante la konspiron sukcesigi sian negocadon en la problemo de la tiel nomata prevento de nuklea disvastigo por tiel konservi sian pozicion de nuklea monopoligo kaj subfosi la revoluciajn batalojn de diverslandaj popoloj. Ĉinio disvolvas nukleajn armilojn ĝuste por oponi la komploton inter Usono kaj Sovetunio en ilia praktiko de nuklea monopoligo kaj nuklea ĉantaĝo. La posedo de telestirataj misiloj kaj nukleaj armiloj de la ĉina popolo estas grandega kuraĝigo al la heroe vjetnama popolo, kiu nun kondukas nacisavan militon kontraŭ la usona imperiismo, kaj al ĉiuj heroe luktantaj revoluciaj popoloj tra la tuta mondo, kaj nova kontribuo al la defendo de la mondpaco.


La necesaj kaj limigitaj nukleaj provoj kaj disvolvo de nukleaj armiloj fare de Ĉinio estas pure por defendi sin kaj ĝia fina celo estas detruo de nukleaj armilojn. Ni refoje deklaras solene, ke en ĉiu ajn tempo kaj en ĉia ajn cirkonstanco, Ĉinio ne uzos la unua nukleajn armilojn. Same kiel antaŭe, la ĉina popolo kaj la ĉina registaro, daŭre batalos firme kaj senŝanceliĝe, por la nobla celo de kompleta malpermeso kaj plena detruo de nukleaj armiloj, kune kun ĉiuj pacamaj popoloj kaj landoj tra la tuta mondo.



# Nova Salto en Industrio kaj Agrikulturo


*Membroj de la Ŝuangŝu-a Popola Komunumo en Pisan-gubernio,  
Hingiang, hakis la monton por fari kampojn por la revolucio.*







*En nia lando oni uzas mikrobojn por liberigi petrolon de parafino kaj tiel produktas atklasan petrolan produkton de malalta solidiĝa punkto. La kvalito multe superis tiun de la samspeca petrolo produkto el eksterlando. Jen la granda fermentujo de la Ŝanhaja Fermenta Fabriko en uzado.*

*La Ŝtata Agrikulturejo de inund-regiono de Flava Rivero en Henan-provinco ricevis bonan rikolton de tritiko ĉi-jare. La laboristoj kaj oficistoj okupiĝas pri sekigado kaj purigado de la tritiko por sendi ĝin al la ŝtato.*




*Dank' al la penso de Maŭ Zedong, la membroj de la Luanguang-a komunumo en Hiagin-gubernio, Sandong-provinco, venkis la gravajn plagojn de sekegeco kaj fiinsektoj, kaj akiris riĉan rikolton de koton. Jen komunumanoj vendas al la ŝtato la novan kotonon.*





*La unua laborejo de aŭtomata konvertil-forno de supra blovado per pura oksigeno en nia lando estas funkcionstruita. Jen laboristoj laboras en manipulejo (maldekstre) por (dekstre) direkti la fornon en fando de ŝtalo.*

*La "fer-bovoj" produktitaj de la Traktora Fabriko "Ruĝas la Oriento" en Luojang, Henan-provinco, atendas survagonigon.*



# Eksterlandaj Amikoj kaj Ruĝaj Gvardianoj

*Dum ĝoja renkontiĝo de la Macujama-a Baleda Trupo kaj ĉefurbaj ruĝaj gvardianoj, ili kune kantas la kanton Navigadon en Maro Oni Dankas al Direktilisto.*

*Sheikh Mukhtar Mohamed Hussein, prezidanto de la Somali-a Nacia Asembleo, estas kun diverslokaj ruĝaj gvardianoj dum vizito al Ŝaŭŝan, Hunan-provinco, la hejmloko de Prezidanto Maŭ.*

